

Johann Wolfgang von Goethe,  
Rozeto en herbejo

*tradukita de Gotthilf Sellin*

Knab' rozeton vidis li,  
Vidis en herbejo;  
Estis juna, bela ĝi,  
Por ĝin vidi kuris li,  
Vidis kun ĝojego.  
Roz', rozeto, ruĝa roz',  
Rozo en herbejo.

Diris knab': mi rompos vin,  
Rozon en herbejo,  
Diris roz': mi pikos vin,  
Ĉiam vi memoros min,  
Mi ne ĝin permesos.  
Roz', rozeto, ruĝa roz',  
Rozo en herbejo.

Knab' sovaĝa rompis ĝin,  
Rozon en herbejo;  
Kvankam roz' defendis sin,  
En koler' ĝi pikis lin,  
Tamen morti devis.  
Roz', rozeto, ruĝa roz',  
Rozo en herbejo.

...

Johann Wolfgang von Goethe,  
Dornrozeto

*tradukita de Kálmán Kalocsay*

Vidis knab': Jen, juna flor'!  
Rozujet' kampara!  
Bela, kiel la aŭror'!  
Li alkuris ĝoje por  
Vidi, kiel kara!  
Rozo, rozo, ruĝa roz',  
Rozujet' kampara.

Diris knab': Mi volas vin,  
Rozujet' kampara.  
Diris roz': Mi boras vin,  
Ĉiam vi memoras min,  
Pro l' dolor' amara.  
Rozo, rozo, ruĝa roz',  
Rozujet' kampara.

Knabo rozon ŝiris do  
De l' rozuj' kampara,  
Ĝi, defende, pikis tro!  
Sed ne helpis ve kaj ho  
Kontraŭ vol' barbara.  
Rozo, rozo, ruĝa roz',  
Rozujet' kampara.

...

Traduko de la Germana poemo “Heidenröslein” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de GOTTHILF SELLIN (\*1844-05-18 – †1921-10-09).

Arg-1022-2071 (2014-12-16 16:00:17)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en [http://kantaro.ikso.net/rozeto\\_en\\_herbejo](http://kantaro.ikso.net/rozeto_en_herbejo). Tie oni povas aŭdi ankaŭ la melodion. Pri la tradukinto vidu la retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Gotthilf\\_Sellin](http://de.wikipedia.org/wiki/Gotthilf_Sellin).

Traduko de la Germana poemo “Heidenröslein” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalman Kalocsa, \*1911 – †1976).

Arg-1022-2226 (2014-12-16 16:56:40)

Tiu ĉi poem-esperantigo troviĝas interalie en [http://egalite.hu/kalocsay\\_eterna/dornrozeto.htm](http://egalite.hu/kalocsay_eterna/dornrozeto.htm).